



estas ĉiumonata gazeteto por Esperantistoj en Halifax-Dartmouth,
Upper Rawdon kaj aliloke en Nov-Skotio (kaj ankaŭ por la mondo).

Numero 198

Oktobro 2002

Laborantoj:

Bob Williamson — Redaktoro, preskontrolisto
Stevens Norvell — kompostisto

Reni Porter — Presisto, enpoŝtigisto, kontisto

Sendu leterojn kaj artikolojn al:

Bob Williamson
329 Poplar Drive
Dartmouth, Nova Scotia
KANADO B2W 4K8
bob.williamson@ns.sympatico.ca

Sendu abon-monon al:
Reni Porter
71 RidgeValley Road
Halifax, Nova Scotia
KANADO B3P 2E5

Abono por Kanado aŭ Usono estas \$8 (kanadaj) kaj por aliaj landoj estas \$15

★ ★

NEKROLOGO — JERZY JARMASZ

D-ro Jerzy Jarmasz el Otavo mortis pro kancero la 26-an de aŭgusto 2002. Li estis eks-delegito de UEA por Otavo, kaj ankaŭ dumviva membro de KEA.

Jerzy naskiĝis en 1939 en Smyga, Pollando. Post la teruraj mizeroj de la milito, li translokiĝis al Francio, kaj poste al Kanado.

Jerzy estis psikologo. Danke al Esperanto, li fine povis reviziti sian hejm-landon en 1987, kiam la Universala Kongreso de Esperanto okazis en Varsovio okaze de la cent-jara jubileo de Esperanto.

Jerzy estis fervora Katoliko kaj multe kunlaboris kun sia eklezio kaj kun la katolika organizo “Développement et paix” (Disvolviĝo kaj paco), kiu helpas al evoluado de malriĉaj landoj. Al li ankaŭ gravis ke Poloj en Kanado memoru ilian kulturon kaj lingvon.

Li postlasas sian vidvinon, Mercedes, kaj tri infanojn.

**Yves Bellefeuille
Otavo**

KIU ESTAS CHRISTER LAURÉN?

Helsingin Sanomat, la plej grava tutlanda gazeto en Finnlando, raportis la 3-an de julio 2002 pri profesoro Christer Laurén, kiu naskiĝis en Helsinko 3.VII.1942. Laŭ li, infanoj bezonas molajn metodojn en lingvoinstruado kaj li trovis ion esence novan en Kanado en 1987. Tiam oni enkondukis en Finnlandon la sistemon konatan sub la nomo Lingva Mergado. Li estas en la Universitato de Vaasa profesoro de la sveda lingvo, sed li faras esplorojn pri la menciita temo ankaŭ kaj en Italio kaj en Aŭstrio. En la venonta aŭtuno 2002-a li iros al suda Rusio kaj eklaboros inter popoloj, kiuj ne komprenas la lingvojn de siaj najbaroj. Profesoro Laurén estas entuziasma kiel juna, eta knabo. Komence mankis financaj rimedoj por la agado, sed jam nun ĉio estas en ordo tiurilate.

En la jaro 2000 aperis lia verko „Fariĝu scipovanto de lingvoj - lingva mergado en praktiko”. En la finna lingvo la libro titoliĝas *Kielten taitajaksi - kielikylypy käytännössä*. La eldonejo estas “Atena Kustannus Oy” en Jyväskylä. Indas konatiĝi kun la enhavo de la nova metodika publikaĵo, kiu plugas tute sovaĝan terenon. Dum siaj laborvojaĝoj prof. Laurén ekkonis s-ron Otto Barck (1926), kiu estas doktoro (*honoris causa*) en la Universitato de Vieno kaj kiu laboras kiel esploristo sur la kampo de ĝenerala lingvistiko. Otto Barck naskiĝis en unulingva germana familio. Hodiaŭ li komprenas tekstojn en almenaŭ 25 eŭropaj lingvoj. Leganto supozeble iomete surpriziĝas legante jenajn vortojn de d-ro Barck: „Sur ĉiuj tavoloj de lingvosciado el ĉiuj de mi konataj fremdaj lingvoj mi plej bone regas Esperanton.” Li estas konvinkita, ke artefarita lingvo estas la plej bona ilo por internacia komunikado.

Lingva Mergado havas longan tradicion. Jam en la malnovaj Persio kaj Egiptio oni instruis fremdajn lingvojn laŭ la pramodelo de Lingva Mergado. Pri la nunaj tempoj oni devas antaŭ ĉio menci Kanadon, kiu havas avanan pozicion sur tiu ĉi branĉo. Tre detale profesoro Laurén klarigas la situacion en Finnlando koncerne la instruadon de la sveda lingvo laŭ la nova metodo sub la menciita titolo. Kiam mi mem instruis dum kvar lecionoj semajne Esperanton 1959-1965 en elementa lernejo, tute hazarde kaj instinkte mi klarigis regulojn dum sportaj lecionoj kaj donis ankaŭ ordonojn al ĝelernantoj en Esperanto. Glate ĉio funkciis kaj infanoj rapide kutimiĝis al mia parolmaniero kaj akceptis ĝin senhezite kaj libervole sen grumblaj esprimoj. La libro de Laurén servas ĉiujn, kiuj interesiĝas pri lingvo-instruado kaj -lernado. Estas ankaŭ mencioj pri malfacilaĵoj en tiu pionira laborado, sed indas provi ĉiujn eblajn vojojn por ke lingvoscio de homoj pliboniĝu. Mergu vin mem kuraĝe en sitelon, kiu enhavas kiel eble plej multajn diversajn lingvojn – ankaŭ Esperanton, kiun forte rekomendas surbaze de siaj propraj spertoj d-ro Otto Barck el Vieno.

Jorma Ahomäki
Aŭgusto 2002
jorma.ahomaki@pp.inet.fi

MEDICINA OPINI-SONDADO

Interreta opini-sondado, supozeble de la American Medical Association (Usona Medicina Asocio) donas la jenajn statistikojn:

1. Japanoj manĝas tre malmulte da graso kaj havas malpli da koratakoj ol britoj aŭ usonanoj, sed inverse la francoj manĝas multajn da grasoĵojn kaj ankaŭ havas malpli da koratakoj ol britoj aŭ usonanoj.
2. Japanoj trinkas tre malmulte da ruĝvino kaj havas malpli da koratakoj ol britoj aŭ usonanoj. Italoj trinkas tre multe da ruĝvino kaj havas malpli da koratakoj ol britoj aŭ usonanoj.
3. La konkludo de la opini-sondado estas ke tio, kion oni manĝas aŭ trinkas ne mortigas lin, sed nur la parolado de la angla lingvo.

— El la Interreto tradukis Ed Harler

Ĉion Kion Mi Devas Scii Mi Lernis De La Arkeo De Noa

1. Ne maltrafu la boaton. (anglalingva esprimo, kiu signifas: Ne estu malfrua.)
2. Ne forgesu ke ĉiu estas en la sama boato. (Ĉiu el ni havas la samajn problemoj.)
3. Planu antaŭe. Ne pluvis tiam, kiam Noa konstruis la arkeon.
4. Restu sana. Tiam, kiam vi atingas 600 jarojn, iu eble petos ke vi faru ion vere grandegan.
5. Ne aŭskultu la kritikantojn, nur faru tion kio necesas.
6. Konstruu vian futuron sur alta tero.
7. Pro la motivo de sekureco, vojaĝu duope.
8. Du kapoj estas pli bonaj ol unu.
9. Rapideco ne ĉiam estas avantaĝo. La helikoj estis surŝipe kune kun la gepardoj.
10. Tiam, kiam vi estas stresiĝinta, flosu portempe.
11. Memoru ke la arkeo estis konstruita de amatoroj; la Titanic estis konstruita de profesiuloj.
12. Memoru ke pegoj interne estas pli granda minaco ol la ŝtormo ekstere.
13. Ne zorgu pri la ŝtormo. Tiam, kiam vi estas unu kun Dio, ĉiam ĉielarko atendas.

— Kontribuis Ed Harler

